

La arbo de la sciado de Pio Baroja tradukita de Fernando de Diego

79-a volumo de Stafeto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 531, 1973.12.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En esperantio bela kutimo volas, ke oni festu la 15-an de decembro, tio estas la zamenhofa festo, per aĉeto de libro. Por tiu ĉi jaro ni venas doni al vi aĉet-konsilon. Akiru la belegan ĵus eldonitan romanon *La arbo de la sciado*.

A.- *La arbo de la sciado* estas romano de Pio Baroja. Ĝin ege talente tradukis el la hispana Fernando de Diego. Tiu libro estas la 79-a volumo sub la marko Stafeto.

Cl.- Pio Baroja naskiĝis en San Sebastian, Vaskio, en 1872. Oni do ĵus celebradis lian centjaran jubileon. Li studis medicinon, doktoriĝis en Madrido per tezo titolita *La doloro*, praktikis medicinon, dum nur du jaroj, poste laboris kiel administranto kaj fine kiel ĵurnalisto. Li multe vojaĝis. La unua libro de Pio Baroja aperis en 1900. Ĝia titolo : *Sombraj vivoj*. Ekde tiu jaro 1900 Pio Baroja sin plene dediĉis al verkado. Kaj en 1935 lia eniro en la Akademion de la Hispana Lingvo signifis la landan kaj oficialan agnoskon al la talento de la romanisto. Dum la hispana civila milito Pio Baroja, kiu ĉiam rifuzis aparteni al politika partio, travivis ege malfacilajn jarojn kun propravola ekzilo. Pio Baroja mortis en Madrido en 1956 post longa malsano. Li estis ano de nenia politika partio, de nenia eklezio kaj ne fondis familion.

A.- Ĝuste tiu sendependeco de Pio Baroja rilate al la politikaj kaj religiaj alfrontadoj malbonfamigis lin. En ĉiuj partioj oni malŝatis tiun liberan homon, kiu aspiris al vivo sen hipokriteco. Ni citu, kion Pio Baroja asertis, kiam en 1935 li eniris la Akademion de la Hispana Lingvo :

Cl.- « *En mia juneco mi aspiris al tio, ke la vivo estu sufiĉe pura. Mensogi, trompi, intrigi tiam ŝajnis al mi kaj ankoraŭ nun ŝajnas neniel digna. Kiam mi aŭdis paroli pri la malpuraĵo de la realo kiel pri io neevitebla, mi protestis interne. La realo ne povas esti malpura, mi diradis al mi; ĝi povas esti barbara, kruela, sed ne malpura. Kio estas malpura, tio estas la hipokriteco. Tiun dualismon pri la pura domo kaj la malpura strato mi neniam vole akceptis. Mi celis lojalan ludon, kaj mi demandadis min : ĉu trompadi ne estas forigi el la ludo ĉian logon ?* »

A.- *La arbo de la sciado*, kies aĉeton ni konsilas al vi, estas la plej universala el la romanoj de Pio Baroja. Jen tio, kion Pio Baroja mem skribis pri sia verko. Ni citas eron el liaj *Memoraĵoj* aperintaj en 1955 :

Cl.- « ***La arbo de la sciado*** estas, inter la filozofiecaj romanoj, la plej bona, kiun mi skribis. Probable ĝi estas la plej perfekta kaj plena el ĉiuj miaj libroj, ĉar ĝi estiĝis en la tempo, kiam kulminis mia intelekta energio. Malgraŭ ĝia tragika fino, mi opinias, ke ĝi ne lasas melankolian feĉon. Ĝin ja konsistigas ia vidado pri la vivo de pasintaj tempoj, ia resumado. »

A.- Doktoro **Juan Régulo-Pérez**, en tre interesa antaŭparolo al la romano *La arbo de la sciado*, tiel priskribas tiun verkon. Ni citas lin iom resume :

Cl.- « **La arbo de la sciado** estas la plej universala el la romanoj de Baroja. [...] Kiel jam konstatis multaj kritikistoj, ni ne troviĝas antaŭ tezo-romano, kies centra ideo estus antagonismo inter ago kaj penso, inter vivo kaj medito, eĉ se tia skemo ja bone konvenus al la romano, plena de abundaj observoj, de ĝustaj priskriboj, de emociaj nuancoj. [...] La romano havas centron, ideologian nukleon : la konversacioj inter **Hurtado** kaj **Iturrioz** pri la senco de la homa vivo. Temas pri konversacioj kompareblaj al tiuj de **Petro** kaj la princo **Bolkonskij** en **Milito kaj Paco** de **Tolstoj**, al la fama epizodo de la **Granda Inkvizitoro** en **La fratoj Karamazov** de **Dostojevskij**. [...] kaj al kelkaj romanoj de **Turgenjev**. (Fino de la citaĵo)

A.- La dialogo inter Hurtado kaj Iturrioz ne venas, kiel atendeble, al ia konkreta intelekta solvo. En ĝi alfrontiĝas du komplementaj tendencoj de la personeco mem de Baroja. Hurtado restas fidela al iu morala puritanismo, la religio kaj la antikva moralo ankoraŭ influas lin, li ne povas liberiĝi de iaj superstiĉoj, inter ili la ideo de pekado. Lia onklo Iturrioz liberiĝis de tiuj tabuoj. Li proponas la starigon de milico simila al tiu, kiun fondis **Ignaco de Loyola**, sed kun nur humana karaktero. Tiu milico havus kiel celon : «*Instrui serenecon, malemon al humileco, al rezignacio, al trompo, al sentimentaleco.* [...] » Hurtado komprenas tiun celadon, sed li ne kapablas ĝin akcepti.

Cl.- Tiu romano *La arbo de la sciado* estas tradukita en mirinda klara stilo fare de Fernando de Diego. Oni havas la impreson troviĝi antaŭ originalaĵo. Ne ĉiam oni povas tion diri.

A.- Fakte la romano *La arbo de la sciado* estas sinsekvo el preskaŭ memstaraj ĉapitroj, ĉiam ege mallongaj. Tio estas favora al fragmenta legado dum liberaj momentetoj. Sed samtempe la etoso de la romano vekas en ni kreskantan intereson. Fariĝas pli kaj pli malfacile forlasi tiun allogan verkon.

Cl.- La venontan semajnon, kiel konkludon al tiu prezento de la romano *La arbo de la sciado* de Pio Baroja, eldonita de Stafeto, ni legos al vi fragmenton el la unua ĉapitro.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!